

9 La Angla

Antaŭ la enkonduko de **Sprak** oni evoluigis diakritaron por la Angla kiel unuiga ĝermana lingvo.

Voĉiĝo: Kiam konsonanto estas voĉa, kvankam ĝi estas skribata senvoĉa, ĝi diakritiĝas kun substreko.

th <u>s</u>		is
[θɪs]		[ɪz]

Tabelo 240: *voĉiĝo*

Ĉapelitaj Literoj: La ĉapelitaj literoj ĉ, ĝ estas prononcataj [tʃ], [dʒ].

ch änĝe		chäös		ĝirö		give
[tʃændʒ]		[ˈkɛɔs]		[ˈdʒaɪrəʊ]		[ɡɪv]

Tabelo 241: *ĉapelitaj literoj*

Malfortaj Vokaloj: Malfortaj vokaloj estas vokaloj, kiuj ŝanĝiĝas al alia vokalo. Kiam vokalo ŝanĝiĝas al *i*, ĝi diakritiĝas kun punkto.

w omèn		b üsy
[wɪmɪn]		[ˈbɪzɪ]

Tabelo 242: *malfortaj vokaloj*

9.1 Mallongaj Vokaloj

Mallonga vokalo diakritiĝas kun hoketo. La mallongaj vokaloj **ă, ĕ, ĭ, ǫ, ŭ** estas prononcataj [æ], [e], [i], [o], [u] en la Angla.⁵²

măn	bĕst	ĭp	tǫp	pŭt
[mæn]	[best]	[ɪp]	[tɒp]	[pʊt]

Tabelo 243: *mallongaj vokaloj*

Post mallonga vokalo, la konsonanta fino estas skribata unuoble nur kiam la vorto ne havas sufikson. Kun sufikso, la konsonanta fino estas skribata duoble.

stǫp	stǫpping
[stɒp]	[ˈstɒpɪŋ]

Tabelo 244: *duoble skribitaj konsonantoj kun finaĵo*

Oni evitas unuoblajn **f, k, l, s** fine de la vorto.⁵³

băck	tĕll	clĭff	bǫss	fŭll
[bæk]	[tel]	[klɪf]	[bɒs]	[fʊl]

Tabelo 245: *duoble skribitaj konsonantoj sen finaĵo*

Kiam mallonga vokalo staras antaŭ **r** ĉe la fino de la vorto⁵⁴, la mallonga vokalo prononciĝas [ɜ].⁵⁵

cărry	hĕr	gĭrl	wǫrd	tŭrn
[ˈkæri]	[hɜ:r]	[gɜ:rl]	[wɜ:rd]	[tɜ:rn]

Tabelo 246: *mallonga vokalo antaŭ r ĉe la fino de la vorto*

⁵²Mallonga **ă** do regule estas palatala, t. e. **ǣ** [æ].

⁵³Anstataŭ **kk** oni regule skribas **ck**.

⁵⁴t. e. kiel lasta vokalo

⁵⁵Notindas, ke ne troviĝas vorto kun mallonga **ă** antaŭ **r** ĉe la fino de la vorto.

Post **w**, mallonga **o** prononciĝas kiel mallonga **u** [ʊ].

wölf		wömänn
[wʊlf]		[wʊmən]

Tabelo 247: *mallonga o*

Kiam *i* staras ĉe la fino de la vorto, ĝi estas skribata *y*.

bërry
[berɪ]

Tabelo 248: *y* anstataŭ *i* ĉe la fino de la vorto

Kiam mallonga **o** staras antaŭ **i** respektive **y**, ĝi estas prononcata [ɔ].

cöin		böy
[kɔɪn]		[bɔɪ]

Tabelo 249: *o* antaŭ *i* aŭ *y*

Mallongaj **o** kaj **u** povas malfermiĝi al [ʌ].

sôn		sûn
[sʌn]		[sʌn]

Tabelo 250: *malfermiĝintaj o kaj u*

9.2 Longaj Vokaloj

Longa **a** malfermiĝis al **â** [ɑ:], kaj longaj **e** kaj **o** fermiĝis al **ě** [i:] respektive **ō** [u:].

âsk	bě	tō
[ɑ:sk]	[bi:]	[tu:]

Tabelo 251: *longaj vokaloj*

Kiam longaj fermiĝintaj **ě** aŭ **ō** staras antaŭ **r**, la longa vokalo prononciĝas diverse. Inter **w** kaj **r**, longa malfermiĝinta **â** prononciĝas kiel palatala **ö** antaŭ **r**.

ârm	wârm	hěre	pōur
[ɑ:rm]	[wɑ:rm]	[ˈhɪrɛ]	[ˈpuər]

Tabelo 252: *longa vokalo antaŭ r*

Kiam longa **â** staras post **w** aŭ **qu** (sed ne antaŭ **r**), ĝi estas prononcata kiel mallonga **ō** [ɔ].

wânt	quâlity
[wɔnt]	[ˈkwɔlɪti]

Tabelo 253: *longa â post w aŭ u*

Antaŭ **t**, **d**, **k**, longa fermiĝinta **ō** povas mallongiĝi kaj tiam prononciĝas kiel mallonga **ŭ** [ʊ].

fōod	fōöt	stōöd	bōök
[fu:d]	[fut]	[stʊd]	[bʊk]

Tabelo 254: *mallonga fermiĝinta ō antaŭ t, d, k*

9.3 Diftongoj

Diftonga **i** estas markata kun streko $\bar{}$. En la Angla, post konsonanto (nur unu), ortografiĝas aldone muta **e**. Fine de la vorto, ortografiĝas **y** anstataŭ **i**.

blīnd	mīne	bȳ
[blaɪnd]	[maɪn]	[baɪ]

Tabelo 255: *diftonga i*

Diftonga **u** estas same markata kun streko $\bar{}$. En la Angla, ĝi ortografiĝas kun *ou* respektive *ow* ĉe la fino de la vorto aŭ antaŭ *n*.

oūt	how̄	toŭn
[aʊt]	[haʊ]	[taʊn]

Tabelo 256: *diftonga u*

Palatala diftongo estas markata kun dupunkto $\ddot{}$.⁵⁶

mäke	gö	müŝic
[mɛk]	[gəʊ]	[ˈmjʊ:zɪk]

Tabelo 257: *palatalaj diftongoj*

⁵⁶Anstataŭ **ǣ**, **ō̄**, **ȳ̄** diakritiĝas **ā**, **ō**, **ū**.

Notindas, ke **i** estas palatala vokalo. Ĝia diftongo **ī** do ankaŭ estas palatala. Tial, anstataŭ **ī** diakriteblas **ĭ**.

mĭnd	wĭne	flĭ
[maɪnd]	[waɪn]	[flaɪ]

Tabelo 258: *diftonga i kiel palatala diftongo*

Ekzistas nek la diftongo **ē** nek la palatala diftongo **ĕ**. Ambaŭ skriboj eblas por anstataŭi longan, fermiĝintan **ĕ**.⁵⁷

bĕ
[bi:]

Tabelo 259: *longa fermiĝinta e kvazaŭ palatala diftongo*

Kiam diftongo staras antaŭ **r** ĉe la fino de la vorto, ĝia prononco ŝanĝiĝas.

cāre	fĭre	fōr	pūre
[ˈkeər]	[ˈfɑrər]	[fɔ:r]	[ˈpjʊər]

Tabelo 260: *diftongoj antaŭ r*

Post mallonga **ŭ**, **ll** regule fariĝis **ll** [ʃ].⁵⁸ Tiam, la prononco de **ŭ** fariĝas malforta [ə]. Alivorte, **ŭll** [əʃ] prononciĝas kiel palatala, diftonga **ŭ** [əʃ].

pōle	rōll
[pəʃl]	[rəʃl]

Tabelo 261: *la diftongo ŭll*

Post mallongiĝinta fermiĝinta **ŭ** [ʃ] asimiliĝis labialigiĝinta duonvokaliĝinta **ll** [ʃ].

wŭll
[wʃl]

Tabelo 262: *mallongiĝinta ŭll*

⁵⁷Tiel eblas listigi la nomojn de la anglaj vokaloj ĉiuj kun dupunkto " : **ā, ē, ĭ, ŭ, ū** [eɪ], [i:], [aɪ], [əʃ], [ju:].

⁵⁸Labialigiĝinta duonvokaliĝinta **ll** prononciĝas kiel mallonga **ll** [ʃ].

9.4 Monoftongoj

En la Angla, **aw** prononciĝas kiel monoftongo [ɔ:].

răw		hăwk
[rɔ:]		[hɔ:k]

Tabelo 263: *la monoftongo ăw*

En latinidaj vortoj, skribiĝas kaj prononciĝas **au** [ɔ:].

Păul		făult
[pɔ:l]		[fɔ:lt]

Tabelo 264: *la monoftongo ău*

Post mallonga **ă**, **ll** regule fariĝis **ll**. Foje, labialiginta duonvokaliĝinta **l** aperas ankaŭ antaŭ aliaj konsonantoj. Same kiel **ăw** [ɔ:] respektive **ău** [ɔ:], monoftongiĝis ankaŭ **ăl** [ɔ:].

hăll		tăllk
[hɔ:l]		[tɔ:k]

Tabelo 265: *la monoftongo ăl*

Malofte, mallonga **ă** restas senŝanĝe antaŭ **l**. Tiam oni escept-okaze ortografias **l** nur unuoble en la Angla.

păl		Ăl
[pæ:l]		[æ:l]

Tabelo 266: *senŝanĝa ăl*

Antaŭ **ĝht** (kun mutiĝinta **ĝh**⁵⁹), anstataŭ **ău** [ɔ:] ofte skribiĝas **ou** [ɔ:].

dăuĝhtěr		căuĝht		thouĝht
['dɔ:tər]		[kɔ:t]		[θɔ:t]

Tabelo 267: *la monoftongoj ăuĝh kaj ouĝh*

Ĉe la fino de la radiko, **gh** foje labialigis al **ĝh** [v] post malfermiĝintaj **ău** aŭ **ou**.

lăuĝh		touĝh
[la:f]		[ta:f]

Tabelo 268: *malfermaj ăuĝh kaj ouĝh*

⁵⁹En la Angla, **gh** regule estas muta. Tial, anstataŭ **ĝh** diakriteblas nure **gh**.

10 La Berlina

Enkondukante **Sprak** kiel interĝermanan pontolingvon, kreskis ne nur la internacia konscio pri ĝermanaj lingvoj, sed same la konscio pri dialektoj ene de la ĝermanaj lingvoj.⁶⁰ Notindas, ke la protektado de lingvoj kaj dialektoj fariĝis trajto de la Movado de Esperanto.

10.1 Ortografio

La ortografio de la Berlina baziĝas sur la norma Ĝermana.⁶¹

ä: En la Berlina, palataliĝinta *ä* regule prononciĝas kiel *e* [e].^{62 63}

germane	Mädchen	[ˈmɛːtʃən]
berline	Mëdchen	[ˈmɛːtʃən]

Tabelo 269: *knabino*

ai: En la Berlina, pra-ĝermana *ai* regule prononciĝas kiel *e* [e].⁶⁴

germane	kein	[kain]
berline	këin	[ke:n]

Tabelo 270: *neniu*

au: En la Berlina, pra-ĝermana *au* regule prononciĝas kiel *o* [o].⁶⁵

germane	auch	[aux]
berline	âuch	[o:x]

Tabelo 271: *ankaŭ*

i: Antaŭ dentaloj, mallonga *i* regule prononciĝas kiel *ü* [ʏ].^{66 67}

germane	Fisch	[fɪʃ]
berline	Fÿsch	[fʏʃ]

Tabelo 272: *fiŝo*

⁶⁰La samo okazis pri la latinidaj kaj slavaj lingvoj post la enkonduko de **Lingŭa kaj Āzik**.

⁶¹Kelkokaze la ortografio de la norma Ĝermana korektiĝis. Radikofina *f* skribiĝis *v*, kiam ĝi voĉiĝas antaŭ vokalo en la norma Ĝermana: *fünf* → *fünv*, *elf* → *ölv*, *zwölf* → *sswölv*, *doof* → *dov*.

⁶²Simile, oni en pli fruaj dialektoj de la Berlina prononcis palataliĝintan *ö* kiel *e* [e]. Tiu prononco estas hodiaŭ eksiginta. Notindas, ke, inverse, ***elf** fariĝis **ölf** (*dek unu*) en la Berlina, probable analoge al **zwölf** (*dek du*).

⁶³Anstataŭ **ë** transskribebblas **ee**. Ekzemple: **Mëdchen** ↔ **Meedchen**

⁶⁴Anstataŭ **ëi** transskribebblas **ee**. Ekzemple: **këin** ↔ **keen**

⁶⁵Anstataŭ **âu** transskribebblas **oo**. Ekzemple: **âuch** ↔ **ooch**

⁶⁶Anstataŭ **ÿ** transskribebblas **ü**. Ekzemple: **Fÿsch** ↔ **Füsch**

⁶⁷Simile, oni en pli fruaj dialektoj de la Berlina prononcis palataliĝintan *ü* kiel *i* [i]. Tiu prononco estas hodiaŭ eksiginta.

ě: En la Berlina, malforta e [ə] plejparte eliziigis (sed ne fine de la vorto). Inter du konsonantoj fine de la vorto, la dua konsonanto fariĝis silaba.

germane	Decke	[ˈdɛkə]	Deckel	[ˈdɛkəl]
berline	Decke	[ˈdɛkə]	Deckl	[ˈdɛkʲ]

Tabelo 273: *kovro, kovrilo*

l, n, s, t: En emfazo, inter longa vokalo aŭ diftongo kaj vortofina *l, n, s, t*, maleliziigis malforta e [ə].

germane	cool	[ku:l]	nein	[nain]	Eis	[ais]	laut	[laut]
berline (emfaze)	cool	[ku:əl]	nein	[ˈnaiən]	Eis	[ˈaiəs]	laut	[ˈlauət]

Tabelo 274: *mojosa, ne, glacio, laŭta*

r: Malforta e [ə] eliziigis antaŭ *r*. Tiam la *r* prononciĝas kiel *a*.⁶⁸

germane	aber	[a:bər]
berline	abř	[a:ba]

Tabelo 275: *sed*

Post *longa vokalo*, *r* prononciĝas kiel *a*.⁶⁹ Post longa *a*, *r* eliziigis.⁷⁰

germane	wir	[vi:r]	Tür	[ty:r]	klar	[kla:r]
berline	wiř	[vi:a]	Tür	[ˈty:a]	klař	[kla:]

Tabelo 276: *ni, pordo, klara*

Post *mallonga vokalo*, *r* eliziigis, se ne sekvas alia vokalo. La mallonga vokalo tiam longiĝis *sen fermiĝi*. Notindas, ke mallonga *e* [ɛ] *ne* longiĝas al [ɛ:], sed anstataŭe kondukas kiel normala longa *e* [e:].⁷¹ Mallonga *a* kondukas same kiel longa *a* antaŭ *r*.⁷²

germane	Art	[art]	Kern	[kɛrn]	Wort	[vɔrt]	Kirsche	[ˈkɪrfə]
berline	Ařt	[a:t]	Kěrn	[ˈke:an]	Wořt	[vɔ:t]	Kiřsche	[ˈkv:fə]

Tabelo 277: *speco, kerno, vorto, ĉerizo*

⁶⁸Tiam, anstataŭ ř transskribblas **a**. Ekzemple: **abř** ↔ **aba**

⁶⁹Probable unue maleliziigis malforta e [ə] antaŭ *r* kaj poste tiuj prononciĝis kiel *a*. Ekzemple: **wir** → **wier** → **wia**

⁷⁰Ankaŭ tiam, anstataŭ ř transskribblas **a**. Ekzemple: **wiř** ↔ **wia**, **Tür** ↔ **Tüa**, **klař** ↔ **klaa**

⁷¹Same, anstataŭ ě [ɛ:] ja prononciĝas ě [e:]. Tial, fermiĝinta longiĝinta e [e:] antaŭ *r* transskribblas ě ↔ ee.

⁷²Ankaŭ tiam, anstataŭ ř transskribblas **a**. La longiĝintan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **Kěrn** ↔ **Keean**, **Wořt** ↔ **Woot**, **Kiřsche** ↔ **Küüsche**

g: Inter vokaloj, *g* fariĝis frikativa **ĝ** [ɣ] respektive post palatala vokalo **ĝ** [j].⁷³

germane	Frage	[ˈfra:gə]	Wege	[ˈve:gə]
berline	Fraĝe	[ˈfra:ɣə]	Weĝe	[ˈve:jə]

Tabelo 278: *demando, vojoj*

En aliaj pozicioj, frikativiginta *g* malvoĉiĝas al **ĝ** [x] respektive post palatala vokalo al **ĝ** [ç].⁷⁴

germane	fragt	[ˈfra:kt]	Weg	[ˈve:k]
berline	fraĝt	[ˈfra:xt]	Weĝ	[ˈve:ç]

Tabelo 279: *(li) demandas, vojo*

Komence de la vorto, *g* fariĝas *j*.⁷⁵

germane	gut	[gu:t]
berline	ĝut	[ju:t]

Tabelo 280: *bona*

ch: En rapida parolado, *ch* fariĝis voĉa fine de la vorto kaj eĉ povas eliziĝi.⁷⁶

germane	doch	[dɔx]	gleich	[glaiç]
berline	doĉh	[dɔɣ]	gleiĉh	[glaij]
berline (rapide)	doĉh	[dɔ]	gleiĉh	[glai]

Tabelo 281: *tamen, egala*

La finaĵo *-ig* prononciĝas (jam en la Germana) kiel *-ich* [ɪç] kaj tial same povas voĉiĝi respektive eliziĝi en rapida parolo.

germane	richtig	[ˈrɪçtɪç]
berline	richtiĝ	[ˈrɪçtɪj]
berline (rapide)	richtiĝ	[ˈrɪçtɪ]

Tabelo 282: *ĝusta*

⁷³Anstataŭ **ĝ** kaj **ĝ** transskribblas indiferente **gh** aŭ distinge **r** respektive **j**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **Fraĝe** ↔ **Fraaghe** ↔ **Fraare**, **Weĝe** ↔ **Weeghe** ↔ **Weeje**

⁷⁴Anstataŭ senvoĉaj **ĝ** kaj **ĝ** transskribblas indiferente **ch**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **fraĝt** ↔ **fraacht**, **Weĝ** ↔ **Weech**

⁷⁵Tiu prononco eksiĝis antaŭ *l*, *r* kaj *ei*, *o*.

⁷⁶Anstataŭ **ĉh** kaj **ĉh** transskribblas distinge **r** respektive **j**. Ekzemple: **doĉh** ↔ **dor**, **gleiĉh** ↔ **gleij**

l: Antaŭ konsonanto, *l* duonvokaliĝas al *l* [ɫ].

germane	halb	[halp]
berline	hałb	[haɫp]

Tabelo 283: *duone*

z: Komence de la vorto, *z* ofte prononciĝas kiel *β* [s]. Tiu prononco estas ekŝiganta.⁷⁷

germane	zu	[tsu:]
berline	ẓu	[su:]

Tabelo 284: *al*

pf: Komence de la vorto, *pf* regule prononciĝas kiel *f* [f]. Fine de la radiko, *pf* regule prononciĝas kiel *p* [p].⁷⁸

germane	pfeifen	[ˈpfaɪfən]	Kopf	[kɔpʃ]
berline	ṗfeifn	[ˈfaɪfɲ]	Kopṑ	[kɔp]

Tabelo 285: *fajfi, kapo*

⁷⁷ Anstataŭ plenfrikativiginta **ẓ** transskribeblas **β** aŭ **ss**. Ekzemple: **ẓu** ↔ **βu** ↔ **ssu**

⁷⁸ Anstataŭ plenfrikativiginta **ṗf** kaj nefrikativiginta **pṑ** transskribeblas **ff** respektive **pp**. Ekzemple: **ṗfeifn** ↔ **ffeifn**, **Kopṑ** ↔ **Kopp**

pn, tn, kn: Kiam pro la elizio de malforta e [ə] kombiniĝis *pn, tn, kn*, la dua nazalo asimiliĝis al silabaj *m* [m], *n* [n], *ng* [ŋ].⁷⁹

germane	hupen	[ˈhu:pən]	bitten	[ˈhu:pən]	decken	[ˈdɛkən]
berline	hupn	[ˈhu:pŋ]	bittn	[ˈbitŋ]	deckn	[ˈdɛkŋ]

Tabelo 286: *hupi, peti, kovri*

tm: La kombino **tm** fariĝis **'m** [ʔm].⁸⁰

germane	Atem	[a:tən]
berline	Atm	[a:ʔm]

Tabelo 287: *spiro*

bn, dn, gn: Kiam pro la elizio de malforta e [ə] kombiniĝis *bn, dn, gn*, la dua nazalo asimiliĝis al silabaj *m* [m], *n* [n], *ng* [ŋ] kaj la voĉa plozivo eliziĝis.⁸¹

germane	haben	[ˈha:bən]	reden	[ˈre:dən]	sagen	[ˈsa:gən]
berline	habn	[ˈha:ŋ]	redn	[ˈre:ŋ]	sagn	[ˈza:ŋ]

Tabelo 288: *havi, paroli, diri*

bm, dm: La kombinoj **bm** kaj **dm** fariĝis **m** [m].⁸²

germane	grobem	[ˈgro:bəm]	jedem	[ˈje:dəm]
berline	grobm	[ˈgro:m]	jedm	[ˈje:m]

Tabelo 289: *al malfajna, al ĉiu*

fn, sn, chn: Kiam pro la elizio de malforta e [ə] kombiniĝis *fn, sn, chn*, la dua nazalo asimiliĝis al silabaj *n* [n], *n* [n], *ng* [ŋ].⁸³

germane	kaufen	[ˈkaufən]	wissen	[ˈvɪsən]	machen	[ˈmaxən]
berline	kâufn	[ˈko:fŋ]	wissn	[ˈvɪsŋ]	machn	[ˈmaxŋ]

Tabelo 290: *aĉeti, scii, fari*

Kiam la vorto ne finiĝas post unu el la supraĵ sonkombinoj, la origina nazalo refariĝas aŭdebla.⁸⁴

⁷⁹Tiam, anstataŭ **n** transskribebblas **m** respektive **ng**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **hupn** ↔ **huupm**, **deckn** ↔ **deckng**

⁸⁰Tiam, anstataŭ **tm** transskribebblas **pm**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **Atm** ↔ **Aapm**

⁸¹Tiam, anstataŭ **n** transskribebblas **m** respektive **ng**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. (Voĉaj plozivoj aperas nur post longa vokalo.) Ekzemple: **habn** ↔ **haam**, **redn** ↔ **reen**, **sagn** ↔ **saang**

⁸²Tiam, anstataŭ **bm** kaj **dm** transskribebblas **m**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **grobm** ↔ **groom**, **jedm** ↔ **jeem**

⁸³Tiam, anstataŭ **n** transskribebblas **m** respektive **ng**. Longan vokalon tiam konsilindas skribi duoble. Ekzemple: **kâufn** ↔ **koofn**, **machn** ↔ **machng**

⁸⁴Ekzemple: **Abnd** ↔ **Aamnd** [a:mnt] (*vespero*)

10.2 Personaj Pronomoj

Krom **ick** kaj **it**, la berlinaj personaj pronomoj egalas al la germanaj personaj pronomoj – sub la berlina prononco. Notindas, ke pronomoj en la Berlina havas specialajn *malakcentatajn* formojn por rapida parolo. Ekzemple, la refleksiva persona pronomo **sich** [zɪç] (*sin, al si*) havas la malakcentatan formon **sĭch** [zɪj]. La dativo anstataŭas la akuzativon, precipe en rapida parolado.

ick	du	eř	sie	it	wiř	ihř	sie
[ɪk]	[du:]	[ˈe:a]	[zi:]	[ɪt]	[ˈvi:a]	[ˈi:a]	[zi:]
ik	dŭ	ěř	sĭe	ĭt	wĭř	ĭhř	sĭe
[ɪk]	[də]	[a]	[zə]	[ət]	[va]	[a]	[zə]
<i>mi</i>	<i>vi</i>	<i>li</i>	<i>ŝi</i>	<i>ĝi</i>	<i>ni</i>	<i>vi</i>	<i>ili</i>
mich	dich	ihn	sie	it	uns	euch	sie
[mɪç]	[dɪç]	[i:n]	[zi:]	[ɪt]	[ʊns]	[ɔyç]	[zi:]
mĭch	dĭch	ĭhn	sĭe	ĭt	uns	euĉh	sĭe
[mɪj]	[dɪj]	[n]	[zə]	[ət]	[ʊns]	[ɔyj]	[zə]
<i>mĭn</i>	<i>vĭn</i>	<i>lĭn</i>	<i>ŝĭn</i>	<i>ĝĭn</i>	<i>nĭn</i>	<i>vĭn</i>	<i>ilĭn</i>
mĭř	dĭř	ĭhm	ĭhř	ĭhm	uns	euch	ihnn
[mɪ:a]	[dɪ:a]	[i:m]	[i:a]	[i:m]	[ʊns]	[ɔyç]	[ˈi:ŋ]
mĭř	dĭř	ĭhm	ĭhř	ĭhm	uns	euĉh	ihnn
[ma]	[da]	[m]	[a]	[m]	[ʊns]	[ɔyj]	[ˈi:ŋ]
<i>al mi</i>	<i>al vi</i>	<i>al li</i>	<i>al ŝi</i>	<i>al ĝi</i>	<i>al ni</i>	<i>al vi</i>	<i>al ili</i>

Tabelo 291: *personaj pronomoj*

ick / ik	du / de	ea / a	sie / se	it / et	wia / wa	ia / a	sie / se
mich / mij	dich / dij	ihn / n	sie / se	it / et	uns / uns	euch / euj	sie / se
mĭa / ma	dĭa / da	ĭhm / m	ĭa / a	ĭhm / m	uns / uns	euĉh / euj	ihnn / ihnn

Tabelo 292: *personaj pronomoj (transskribitaj)*

La malakcentataj personaj pronomoj uziĝas post verboj kaj konjunkcioj. Por skribi tiajn kombinojn, uzeblas apostrofoj por indiki la unuopajn elementojn. Ili transskribeblas kiel unu vorto.

- verbo: **kann sie** → **kann'sĭe** ↔ **kanse** (*povas ŝi*)
- konjunkcio: **wenn du** → **wenn'dŭ** ↔ **wende** (*se vi*)

La konjunkcio aŭ verbo povas parte eliziĝi. Kiam eliziĝis *n*, la malakcentata **ik** fariĝis **ink**.

- verbo (parte eliziita): **find ick** → **fin'ik** → **f'ink** ↔ **fink** (*trovas mi*)
- konjunkcio (parte eliziita): **wenn ick** → **wenn'ik** → **we'ink** ↔ **wejnk** (*se mi*)

En rapida parolado, post dentalo, la malakcentata formo **dŭ** ↔ **de** malfortiĝas al **dŭ** ↔ **e**.

- verbo + malforta du: **hast du** → **hast'dŭ** → **hast'dŭ** ↔ **haste** (*havas vi*)
- konjunkcio + malforta du: **wenn du** → **wenn'dŭ** → **wenn'dŭ** ↔ **wenne** (*se vi*)

10.3 Artikoloj

Difinaj Artikoloj: La *montraj pronomoj deř, die, dit* estas pli-malpli same ofte uzataj kiel la respektivaj personaj pronomoj *eř, sie, it*.⁸⁵ ⁸⁶ Antaŭ substantivo, la montraj pronomoj uziĝas kiel *difinaj artikoloj*.⁸⁷

deř [de:a]	die [di:]	dit [dɪt]	die [di:]
“li”	“ŝi”	“ĝi”	“ili”
den [de:n]	die [di:]	dit [dɪt]	die [di:]
“lin”	“ŝin”	“ĝin”	“ilin”
dem [de:m]	deř [de:a]	dem [de:m]	den [de:n]
“al li”	“al ŝi”	“al ĝi”	“al ili”

Tabelo 293: *difinaj artikoloj el montraj pronomoj*

Malakcentataj formoj de la artikoloj uziĝas nur post prepozicio.⁸⁸

- **prepozicio + artikolo:** *bei deř* → *bei'deř* ↔ *beida* (*ĉe la (ŝi)*)

Post dentalo, la *d* eĉ de la artikoloj **dĥe** kaj **dĥeř** eliziigis.

- **prepozicio kun dentalo:** *an die* → *an'dĥe* ↔ *anne* (*sur la flankon de la (ŝi)*)

Se ekzistas mallongigita kombino en la Germana, tiu prefere uziĝas en la Berlina.⁸⁹

- **germana kombino:** *zur* → *žuř* ↔ *ssua* (*al la (ŝi)*)

Nedifinaj Artikoloj: La substantivigita adjektivo **ĥinř** ↔ **eena** (*iu*) uziĝas kiel *nedifina artikolo* en la formo **ĥin** ↔ **een** (*(nedifina artikolo) “iu”*).⁹⁰ La *malakcentata formo* estas sen *ĥi* kaj estas ĉiam uzebla, sen asimilo al ia ajn antaŭa vorto.⁹¹

ĥin [e:n]	ĥine [e:nə]	ĥin [e:n]
“iu” (<i>li</i>)	“iu” (<i>ŝi</i>)	“iu” (<i>ĝi</i>)
ĥinn [e:n]	ĥine [e:nə]	ĥin [e:n]
“iun” (<i>li</i>)	“iun” (<i>ŝi</i>)	“iun” (<i>ĝi</i>)
ĥinm [e:m]	ĥinř [e:nə]	ĥinm [e:m]
“al iu” (<i>li</i>)	“al iu” (<i>ŝi</i>)	“al iu” (<i>ĝi</i>)

Tabelo 294: *nedifinaj artikoloj*

⁸⁵ Observeblas, ke la montra pronomo **dit** uziĝas kvazaŭ la persona pronomo **it**. Kompense, oni uzas la emfazan finaĵon **-e** [ə] por la demonstra pronomo **ditte**.

⁸⁶ *Malakcentate*, tamen, uziĝas nur la formoj de la personaj pronomoj **eř, sie, ĥt**.

⁸⁷ Al la montra pronomo **deenn** [de:n] (*al tiuj*) respektivas la difina artikolo **den** [de:n] (*la (al tiuj), “al ili”*).

⁸⁸ Notindas, ke tiuj malakcentataj formoj egalas al tiuj de la personaj pronomoj, krom **dĥe** ↔ **de** kaj **dĥeř** ↔ **da**.

⁸⁹ Ekzemple, prefere uziĝas **žuř** ↔ **ssua** anstataŭ (regula) **žu'deř** ↔ **ssuda**.

⁹⁰ La neŭtra formo de la substantivigita adjektivo **ĥinř** ↔ **eena** uziĝas kiel la numeralo **ĥins** ↔ **eens** (*umu*).

⁹¹ Ekzemple: **ĥin Mann** → **n Mann** (*viro*)

11 La Germana

Enkondukante **Sprak** kiel interĝermanan pontolingvon, la germana ortografio ekŝajnis plej draste malsama ol tiuj de la aliaj ĝermanaj lingvoj. Evidentiĝinte la plej ĉikana ortografio de la plej dialektiĝinta ĝermana lingvo, ĝi asimiliĝis al pli interĝermana aspekto.

11.1 Majuskloj

Substantivoj ne plu skribiĝis majuskle.

dame	land	tasse
Dame	Land	Tasse
<i>damo</i>	<i>lando</i>	<i>taso</i>

11.2 Vokaloj

Longaj Vokaloj kun h: Longaj vokaloj ne plu skribiĝis kun *h*, sed verboj kun radikofina palatala vokalo skribiĝis kun muta *j* respektive muta *w*, kiam la vokalo fariĝis malpalatala en la konjugacio.⁹²

lam	stelen	boren	müle	sejen	saw
lahm	stehlen	bohren	Mühle	sehen	sah
<i>lama</i>	<i>ŝteli</i>	<i>bori</i>	<i>muelejo</i>	<i>vidi</i>	<i>vidis</i>

Longaj Vokaloj kun Duobligo: Longaj vokaloj ne plu skribiĝis duoble.

sal	bet	bot
Saal	Beet	Boot
<i>salono</i>	<i>bedo</i>	<i>boato</i>

Longaj Vokaloj kun e: Longaj *e* kaj *i* nur fine de radiko daŭre skribiĝis *ee* kaj *ie*.⁹³

mer	bir	tee	sie
Meer	Bier	Tee	sie
<i>maro</i>	<i>biero</i>	<i>teo</i>	<i>ŝi</i>

Por eviti konfuzon kun la prepozicio *in* (kaj *im*), oni skribis *ien* (respektive *iem*) por la pronomo “*lin*” (respektive “*al li*”).⁹⁴

in	im	ien	iem
in	im	ihn	ihm
<i>en</i>	<i>en la</i>	<i>lin</i>	<i>al li</i>

⁹²Fine, tiu skribo aboliĝis: **sejen** → **seken** → **seen**, **saw** → **sak** → **sa**

⁹³Fine, tiu skribo aboliĝis: **tee** → **të** → **te**, **sie** → **sī** → **si**

⁹⁴Fine, tiu skribo aboliĝis: **ien** → **in**, **iem** → **im**

11.3 Diftongoj

Diftongoj skribiĝis per nur unu vokalo kun streko.⁹⁵

stēn	mīn	mūs	mȳse	hȳte	mūr	fȳr
Stein	mein	Maus	Mäuse	heute	Mauer	Feuer
ŝtono	mia	muso	musoj	hodiaŭ	muro	fajro

11.4 Konsonantoj

Mallongigo de *sch* kaj *ch*: Anstataŭ *sch* skribiĝis *s* (antaŭ konsonanto) respektive *sh* (kiam ĝi evoluis el *sk*, t. e. antaŭ vokalo, antaŭ *r* kaj fine de radiko).⁹⁶ Kiam la prononco de *chs* estis [ks], oni skribis *x*.⁹⁷

snur	fish	shriben	fah	wax
Schnur	Fisch	schreiben	Fach	Wachs
ŝnuro	fiŝo	skribi	fako	vakso

Kiam radikofina *ch* mutiĝis, oni skribis mutan *j* (post palatala vokalo, alikaze: *w*).⁹⁸

nah	naw	näjer	nähst	hoh	höjer	höht	howhēt
nach	nah	näher	nächst	hoch	höher	höchst	Hoheit
post	proksima	pli proksima	plej proksima	alta	pli alta	plej alta	moŝto

Etimologia Skribo: Kiam la prononco de *v* estis [f], oni skribis *f* ĉe *pra-ĝermanaj* vortoj. Analoĝe, oni skribis *kw* anstataŭ *qu* en *ne-latinaĵ* vortoj. Kontraste, oni skribis laŭ la origina ortografio de latin(id)aj respektive *pra-grekaj* vortoj.

fater	kwirlen	divan	circus	plac	matrazze	politī
Vater	quirlen	Diwan	Zirkus	Platz	Matratze	Polizei
patro	kirli	divano	cirko	placo	matraco	polico

Fine, oni ĝenerale skribis *pra-ĝermanajn* vortojn pli etimologie, precipe je frikativoj...⁹⁹

pad	kopp	ŝkip	tigel	katte	strathe	tuĥ	naĥt	magt	ŝkriht
Pfad	Kopf	Schiff	Ziegel	Katze	Straße	Tuch	Nacht	Macht	Schrift
pado	kapo	ŝipo	tegolo	kato	strato	tuko	nokto	potenco	skribo

... kaj elizioj.¹⁰⁰ Kiam *pra-ĝermana* **eu* prononciĝas [i:], oni skribis *ÿ*.

flÿgen	flÿgen	fluht	lÿkten	lÿkt	ŝkuĥ	swÿt	haĥet	gibet	steht
fliegen	fliehen	Flucht	leuchten	Licht	Schuh	süß	hat	gibt	steht
flugi	fuĝi	fuĝo	lumi	lumo	ŝuo	dolĉa	havas	donas	staras

⁹⁵Ĝenerale, oni povis skribi *ee*, *ii*, *uu*, *uue/yy* same kiel *ē*, *ī*, *ū*, *ÿ*.

⁹⁶Fine, tiu skribo aboliĝis: *fish* → *fiŝk* → *fish* → *fiŝ*

⁹⁷Fine, tiu skribo aboliĝis: *wax* → *waks*

⁹⁸Fine, tiu skribo aboliĝis: *naw* → *naĥ* → *na*, *näjer* → *näker* → *näer*

⁹⁹Frikativigintaj plozivaj skribiĝis kun ĉapelo, sed oni povis skribi *tz*, *th*, *kh*, *gh*, *bh* anstataŭ *tt*, *t*, *k*, *g*, *b* skribante etimologie: *tzigel*, *katze*, *strathe*, *tukh*, *maght*, *skhribht* anstataŭ *zigel*, *kaze*, *straße*, *tuh*, *maht*, *shrift*.

¹⁰⁰Anstataŭ etimologie plej ĝusta *ŝk* oni retrostile skribis simple *sh*, respektive fine *ŝ*: *shuw* → *ŝkuĥ* → *shu* → *ŝu*